

V-19449/48

(1977)

del

Bulgara ESPERANTISTO





E-kurso de lernantoj en Kneža kun instruistino Rosica Gârkova
(vd. la adreson en „Dezirás korespondi“)



Esperantistoj el Përërov
(vd. paĝon 15)

Abonu „DER ESPERANTIST“ — organo de Centra Laborrondo Esperanto de GDR. Jare aperas 6 numeroj. Abonkotizo 1,10 bulgaraj levoj. Sumojn sendu per poŝtmandato al: 1303 Sofio, ul. Opálčenska 15, Jordan Čaljovski.

ENHAVO

* * * Jubilea ĵaro por la Bulgara Esperantista Asocio	1
* * Verda Tabulo	2
Ekaterina Ŝeveljova. Skobelev-parko	3
* * * Antaŭ la Rusa-Turka Liberiga Milito	3
Ĝ. A. Makgahan. La indigno atingis sian kulminon	4
* * * Semajno de Internacia Amikeco	6
Prof. d-ro St. Ĝuĝev. Ĉu Esperanto taŭgas por muzika kreado kaj interpretado?	7
Canko Murgin. La unuaj paŝoj de Esperanto en Bulgario	8
Svetoslav Kolev. „DJU — V“ en la Pacifika Oceano	11
Jindřich Tomišek. Letero el frata Ĉeĥoslovakio	15
Gr. G. E-agado en Kazanĥio	15
* * * Interkonsento pri kunlaboro inter ĈEA kaj la Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj	15
* * * Ĉiu devas labori	16
* * * Etaj novaĵoj pri Esperanto en la turismo	16
* * Tra la gazetaro	16
* * * III Internacia Esperantista Ferio-Seminario en Velingrad	III
* * * Deziras korespondi	III
* * * Internaciaj B-Kursoj en Burgas	IV

Sur la kovrilpaĝo :

La bulgara popolo renkontas siajn liberigintojn — la rusan armeanojn (1877)

Redakta Komitato :

Kunĉo VÁLEV (ĉefredaktoro), Dimitro HAĜIEV, Asen GRIGOROV, Nevenka ALEKSIEVA, Ĥristo GOROV, Krástju KARUCIN, Ĥaim LEVI, Ljuba BOJAĜIEVA, Dimitro DENĈEV, Marin BĀCEV, Vasja PETROVA.

Korektis Vasja PETROVA

**JUBILEA JARO POR LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO**

Solidan aĝon atingis la Bulgara Esperantista Asocio — jam 70 jarojn! Ĝia naskiĝo eventis je la 5 de aŭgusto 1907 en la iama ĉefurbo de nia lando — Veliko Tŕrnovo. Ĝiaj baptopatroj estis areto da popolaj intelektuloj. Per tio plenumiĝis la deziro de la unuaj bulgaraj esperantistoj, kies nomojn oni trovas en la listo, aldonita al la n-ro 12 de la Zamenhofa «La Esperantisto»: Miĥloslav Bogdanov, Georgi Oreŝkov kaj Ĥristo Popov, esperantiĝintaj baldaŭ post la apero de la unua lernolibro de Esperanto.

La nova organizo ricevis nenian oficialan apogon. Etlurĝoj kaj filistoj, kiuj tiutempe dominis en nia lando, konsideris la esperantistojn viktimoj de vanaj revoj kaj iluzioj. Akademiano Atanas D. Atanasov — ADA jene skribas pri tiu periodo: «Nomi sin esperantisto — tio per si mem estis heroaĵo. Al simila kuraĝulo nur malmultaj ne ekrigardis kiel al frenezulo kompatinda.»

Tamen la unuaj pioniroj, kiuj laboris en tiu malĝojiga tempo, ne perdis kuraĝon. Per gazetoj kaj broŝuroj kun firma kredo kaj obstino ili propagandis la Internacian Lingvon. Stilistoj kiel Georgi Atanasov, ADA, Ivan Krestanov kaj aliaj tradukis en Esperanton prozaĵojn kaj poeziaĵojn, montrante per tio la perfektecon de la lingvo.

Paŝo post paŝo la publika intereso al Esperanto kreskis. La nacia poeto Ivan Vazov, aŭtoro de mondfama romano «Sub la jugo», skribis: «Laŭ mi Esperanto estas la plej perfekta artefarita lingvo, kreita kun celo interproksimigi la popolojn kaj fari kompreneblaj la kulturvaloraĵojn de diversaj nacioj». Samopiniis la poeto Canko Cerkovski. Aŭtoritataj sciencistoj-filologoj kiel prof. Ivan Ŝiŝmanov kaj akad. Stefan Mladenov rekomendis la lernadon de Esperanto kaj pledis por ĝia ĝenerala akcepto. En la jaro 1921 venis oficiala agnosko — la Ministerio de Popola Klerigo enkondukis nedevigan instruadon de Esperanto en la realajn mezgradajn lernejojn.

Post la venko de la Granda Oktobra Revolucio en Ruslando, en la vicoj de la bulgara laborista movado kreskis la nombro de la adeptoj de Esperanto. Havante nek tempon, nek rimedojn lerni naciajn lingvojn, la nialandaj proletoj utiligis la Internacian Lingvon por kontakti kun samklasanoj el aliaj landoj. Aŭtoritataj marksistoj kiel Todor Pavlov, Georgi Bakalov, Asen Zlatarov ka. donis al Esperanto moralan apogon. «Via peresperanta agado estas valora. Vi devas daŭrigi tiun agadon!» — diris al la esperantistoj la granda filo de nia popolo, la mondfama revoluciulo Georgi Dimitrov.

Nova etapo de Esperanto ĉe ni komenciĝis post la venko de la popola antifaŝista ribelo en 1944 j. La bulgaraj esperantistoj metas sian brikon en la konstruadon de la nova socio en nia lando. Samtempe ili laboras por kres-

-kigi novan generacion de esperantistoj. Regule aperas „Bulgara Esperantisto“, kies eldonkanto superis 6000 ekzemplerojn. Nuntempe en ĉiuj distriktaj urboj funkcias gvidorganoj de BEA. La nombro de la Esperanto-societoj superas 250.

Enkadre de BEA estas kreitaj sekcioj de esperantistoj fervojistoj, filologoj, verkistoj, teknikistoj, instruistoj, poŝtistoj, kuracistoj, turistoj, juristoj, filatelistoj, junuloj. Al la sekcio de esperantistoj-instruistoj estas konfidita la instruado kaj edukado de novaj esperantistoj kaj Esperanto-instruistoj. Ĉi-jare ĝi naŭan fojon organizos la Internaciajn Kursojn por E-Instruistoj en u. Burgas. Gravan laboron faras la sekcio de Mondpaca Esperanto-Movado. Ĝi eldonas la dumonatan organon de MEM „Paco“ kaj la bultenon „Pacaktivulo“. Lastatempe aktivigis la sekcio de esperantistoj-sciencistoj. Ili tradukas, redaktas kaj eldonas revuon „Scienca Mondo“ — organo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj. La filatelista sekcio zorgas pri penetro de Esperanto en la filatelon, pri aperigo de novaj E-poŝtmarkoj, aranĝo de ekspozicioj ka. La sekcio de Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA) eldonas ĝian organon „Interligilo“. Nia plej multnombra sekcio — Bulgara Esperanto-Junularo — zorgas pri kreskigo de novaj E-fortoj. Nun ĝi faras ĉion necesan por la 34-a kongreso de TEJO, kiu okazos venontjare en Târnovo — la naskiĝurbo de BEA. Lige kun tio la sekcio plivigligas la aktivecon de studentoj, mezlernejanoj, junpioniroj.

Ankaŭ la distrikta estraro en Varna — la kongresurbo de la 63-a UK — perfektigas sian agadon, fondas novajn E-societojn. Rimarkinda estas la aktiveco de la distrikta estraro en Smoljan. Ĝi iniciatis unikan entreprenon — konstruadon de Internacia Esperanto-Kursejo. Ĝia inaŭguro okazos tuj post la fermo de UK en 1978. La esperantistoj de Velingrad — la urbo, kiu portas la nomon de la pereinta en la kontraŭfaŝisma batalo esperantistino Vela Peeva, jam trian fojon organizas ferion por enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj.

Jen kiom vasta estas la fronto, sur kiu batalas la bulgaraj esperantistoj dum la jaro, kiam ili celebras la 70-jaran jubileon de BEA kaj la 90-jaran jubileon de Esperanto. CE de BEA firme kredas, ke venontjare la bulgaraj esperantistoj inde renkontos la du gravajn aranĝojn — la 63-an UK en Varna kaj la 34-an kongreson de TEJO en Veliko Târnovo.

VERDA TABULO

En USSR en pli ol 400 lokoj estas kolektitaj 1035 abonoj de „Bulgara Esperantisto“ por 1977 j.

Inter la kolektantoj plej multe kontribuis:

Karlo Varkauskas el Kaunas — kolektis 66 abonojn

Ilija Gerzon el Harjkov — 53 abonojn

Lina Jenikejeva el Ufa — 46 abonojn

Zoja Skvorcova el Kujbiŝev — 32 abonojn

Volodja Bepalov el Soĉi — 26 abonojn.

Koran dankon al niaj sovetaj kamaradoj!

«Bulgara Esperantisto» devas esti en la manoj de ĉiu bulgara esperantisto! Abonu! Abonigu!
Tio ankoraŭ eblas! Ni nepre atingu 6100!



Ekaterina Seveljova

SKOBELEV-PARKO

Belegas Skobeleva Park'
sur montaltaĵo apud Pleven.
Anstataŭ tondro de atak' —
silento de arbar' sin sternas.
Falintajn rusojn tie ĉi
respektas danke Bulgario.
Sed jen — ekstrema parko ĉi
de ĝemo, ŝajne alarmkrio.
Lamenta, malespera son' —
kvazaŭ kapbatoj kaj singultoj
vidvinaj en malnova dom' . . .

. . . Ho, kiel ĝemas tiuj turtoj!
Nenie aŭdis mi, ho ne! —
ke oni tiel memorigas.
Pri kia plago kaj pere'
vi min kaj ĉiujn nin avertas?
Ho, plu neniam milittag'!
Por paco la popoloj luktas.
Por ĉiu dom', por ĉiu park'!
. . . Ho, kiel ĝemas tiuj turtoj!

El la rusa: Asen Grigorov

ANTAŬ LA RUSA-TURKA LIBERIGA MILITO

La historio konas multajn militojn. Sed escepto estas la militoj, kiujn la popoloj eniras por la libera historia ekzistado de aliaj popoloj. Ekzemplo de plej nobla memofero estas la Liberiga Rusa-Turka Milito de 1877—1878 j. „De la glaciaj polusaj dezerto ĝis la varmegaj valoj de Kartvelio, de Vislo ĝis la Pacifika Oceano ekportiĝis uragano de popola entuziasmo. . . Tuta Rusio kuniĝis en unu grandan animan impulson iri helpe al siaj slavaĵ gefratoj kaj agi por ilia liberigo“ — skribas Nemiroviĉ-Danĉenko¹ kaj Sergej S. Tatiŝĉev², samtempuloj de tiu ĉi historia evento.

Kia estas la rilato de la granda rusa popolo kaj de ĝia intelektularo al la liberiga misio de la rusaj armeoj, plej klare montriĝas en la alvoko de Vladimir Vasiljeviĉ Stasov³ al la komandantoj de la Danuba Armeo:

„Sinjoroj! Mi alparolas vin pri demando,

¹ Vladimir Ivanoviĉ Nemiroviĉ-Danĉenko (1858—1943) — elstara rusa kaj poste soveta teatra aganto, reĝisoro kaj dramverkisto.

² Sergej Spiridonoviĉ Tatiŝĉev (1846—1905) — rusa historiisto kaj publicisto.

³ Vladimir Vasiljeviĉ Stasov (1824—1906), eminenta rusa pentroarta kaj muzika kritikisto, kunbatalanto de la progresemaĵ pentristoj kaj komponistoj, organizita en „Moguĉaja Kuĉka“ (La Fortega Grupo).

kiun mi konsideras tre grava. . . Mi havi la okazon tralegi artikolon en la anglarevuo „Daily News“. Temas pri bulgaraj preĝejoj kaj bulgaraj freskoj, pri bonegaj lignogravuraĵoj kaj pri mirindaj oraj kaj arĝentaj objektoj, fine pri ĉemizoj, anatŭtukoj, broditaj per oro, silko aŭ kotono. Kaj ĉu nome ni devas montri neinteresecon rilate la arton, t. e. la spiritan vivon de la bulgaroj, kiam inter ni kaj ili estas tiom da komuna kaj laŭ gento, kaj laŭ vivmaniero, kaj laŭ religio? Ĉu ja ni ne devas antaŭ ĉiuj ceteraj aprezi tion, kio ĉe ili reprezentas originalan arton? . . . Nature, tu multaj voĉoj respondos al mi: „Pardonu, sed kial vi parolas pri tio? Ĉu la militistoj havas tempon por sin okupi pri ĉiuj viaj elpensoj? Ĉu devas interesiĝi pri arkitekturo kaj pentroarto, pri broditaj ĉemizoj aŭ oraj ornamaĵoj la homoj, kiuj transiras Danubon kaj la Balkanmontaron tiel, kiel neniu iam estis transirinta ilin. . .“ Jes, ili devas interesiĝi kaj pri la arkitekturo, kaj pri la pentroarto, kaj pri la broditaj ĉemizoj, kaj pri la oraj ornamaĵoj — mi respondas. Tie ĉi estas nenio vanaĵo. . . Tio, kio estis kreita de la popolo dum tagoj de feliĉo kaj riĉeco, tio, kio estas primas la movadon de ĝia animo, ĝian tutan internan mondon, de la unua ĝis la lasta trajto, devas stari je unu el la unuaj lokoj antaŭ la rigardo de la homoj, kiuj iras por revenigi la tagojn de feliĉo, kontentiĝi ka

spirita paco. . . Kaj tiam post vi en nia historio restos postsignoj ne nur kiel grandanimaj, helaj liberigintoj, sed samtempe ankaŭ kiel gardantoj de la popolaj kreaĵoj kaj vivo. . .“

La granda rusa hirurgo kaj fondinto de la milita hirurgio Nikolaj Ivanoviĉ Pirogov⁴, kiu en la unuaj tagoj de oktobro 1877 ĉe plej granda neĝblovo, 67-jara, trapasis Danubon per pontona barko, diris:

„Iam, kiam mi kuracis Garibaldi sur bul-

gara tero, oni kulpigis min ke mi strebas al gloro. KREDU min, la hodiaŭajn operaciojn de konataj al neniuj bulgaroj mi faris kun ne malpli granda deziro ol tiujn de Garibaldi. La kuracisto ne strebas al la gloro, li strebas al morala kontentigo. La rusa armeo ne strebas al kronoj, sed al la frata amo.“

⁴ N. I. Pirogov (1810—1881) — granda rusa hirurgo kaj anatomo, profesoro en la Medicina Hirurgia Akademio en Petrogrado.

LA INDIGNO ATINGIS SIAN KULMINON

El raportaĵo de antaŭ 100 jaroj

Kiŝinev, la 29-an de januaro 1877

. . .Se temas pri la estonta movado de la rusa armeo en okazo de milito, mi pensas, ke por atingi Danubon ĝi bezonos pli da tempo ol oni ĝenerale supozas. . . La vintra kampanjo por unu armeo, kiu havas la taskon agi ofensive, estas io tre nedezirata kaj malgraŭ ke la rusoj povas elteni ĝiajn malfacilaĵojn pli bone ol ĉiuj soldatoj en la mondo, tiuj malfacilaĵoj estas tiom grandaj, ke mi ne povas pensi, ke eĉ iu rusa militestro decidus entrepreni ĝin sen ekstrema neceso. Kaj nun tia neceso ne aperis. Atendinte tiom longe, Rusio havas neniun videblan bezonon. . . ne atendi ankoraŭ ĝis la printempo kaj tiam laŭ sia konsidero komenci la ofensivon. . . Aperas do la demando, kia estis, en tiu okazo, la celo de la mobilizo? Ankaŭ min, mi konfesas, ĝis nun tiu demando forte embarasis. Sed ekde kiam mi estas veninta tien ĉi, mi komencas kompreni tiun celon — kaj ĝi estas tia, ke ĝi kaŭzos malmultan plezuron al la amikoj de Turkio.

La mobilizo estas ordonita simple pro tio, ke la indigno de la rusa popolo kontraŭ la kruelaĵoj de la turka malordo atingis sian kulminon. Oni devis ion fari por iom trankviligi tiun ĉi indignon. . . La paŝo estas sukcesa: nun la lando atendas trankvile kaj pacience, ĉar ĝi havas certecon kaj garan-

tion pri la intenco de la imperiestro fari ion por la slavo en Turkio. . .

La fakto mem, ke la registaro trovis necesa fari tian multekostan paŝon antaŭtempe kaj nure por trankviligo de la publika opinio, atestas pri la profundo kaj la forto de tiu ĉi sento, pri kiu povas erari neniuj, kiu konas la rusojn tiel, kiel mi ilin konas. Inter la oficiroj oni aŭdas nek fanfaronadon, nek vante sonantajn parolojn, nek malestimajn opiniojn pri la turka braveco kaj digno, nek neseriozajn priaksojn pri la malfacilaĵoj de la milito kaj de la turkaj rimedoj de kontraŭstaro; ne estas krioj, nek popolkantoj, kiel en la tempo de la Krimea Milito. Male, pri la milito ĉiuj parolas kiel pri tre serioza entrepreno, kaj mi aŭdis eĉ ne de unu homo el la civitanaro aŭ el la militistoj paroli pri facila kaj certa venko. . . Sed ĉie ajn, kie vi povus ĉeesti, en la paroloj sonas firma, trankvila decidemo, kiu aŭguras nenion bonan por la turkoj. . .

. . .Se temas pri la intencoj de la rusoj, mi rimarkas neniujn simptomojn, nek aludojn pri deziroj kaj esperoj okupi Istanbulon aŭ kian ajn parton de la Turka Imperio. Dirante tion, mi ne tuŝas la sekretajn planojn de la rusaj diplomatoj aŭ ŝtatestroj, pri kiuj planoj mi ne pretendas ion



scii. Se temas tamen pri la rusoj kiel popolo, ili konkerajn planojn ne havas. Kaj se oni min demandus, kiuj motivoj, tiukaze, gvidas la rusojn por deziri la militon, mi respondos senhezite: la malamo al la multjara malamiko kaj la simpatio al la suferanta popolo, kiu estas proksima al ili laŭ deveno, lingvo kaj religio. Mi scias, ke ĉe ni — la homoj de la angla-saksa raso — oni kutime priridas similajn motivojn kaj rilatas malfide al ili. . . La ĉiama sorto de la homoj, kiuj komprenas nur profitcelojn, estas suferi malvenkon kaj memtrompiĝon, kiam ili havas rilatojn kun malamiko gvidanta sin de la pli altaj konvinkoj de honoro, leĝeco, justo, kompato kaj grandanimeco. Mi estas tute preta konfesi, se vi dezirus, ke eĉ ne unu el la popoloj, apartenantaj al la angla-saksa raso, povas entrepreni militon por tiaj senprofitaj celoj, sed mi ne konsentus aserti, ke hodiaŭ la rusoj ne estas kapablaj fari tion.

Kaj por pruvi mian opinion mi montras tre signifoplenan fakton. De socia vidpunkto tiu fakto estas la plej konsiderinda paŝo sur la vojo de la progreso dum la deknaŭa jarcento, la plej granda el la sociaj turniĝoj, kiuj ĝis nun okazis — tio estas la maldistingo de la sklaveco. . . La rusoj donis al siaj sklavoj (la servutuloj — *noto de la red.*) liberecon kaj teron senproteste. La angla-saksaj sklavposedantoj (en Usono — *noto de la red.*)

malgraŭ la tuta teruro kaj kruelaĵoj de sia sistemo, neglektante la publikan opinion de la tuta mondo. . . ne hezitis levi la armilon defende al tio, kion ili nomis sankta rajto de la propreco. Kaj antaŭ tiu angla-saksa dio, t. e. *la poŝo*, ili oferis la honoron, la leĝecon, la humanecon, la patriotismon kaj la vivon de miloj da homaj estaĵoj, provokante en sia lando teruran kaj plagan militon.


Tiuj du sociaj turniĝoj, la unua, la angla-saksa, kaj da dua — la slava. . . entenas en si profundan historian signifon, kiu povas doni al ni, la apartenantaj al la angla-saksa raso, materialon por meditado. Tiuj du grandaj turniĝoj portas en si la stampon de la du grandaj popoloj kaj, evidente, indikas la esencan diferencon inter ties karakteroj.

Ni eble ne estas kapablaj entrepreni militon por liberigo de iu subigita samgenta al ni popolo, sed tio ankoraŭ ne estas argumento, ke la rusoj estas nekapablaj fari tion. Ni eĉ trovis ebla entrepreni militojn kun celo daŭrigi la sistemon de la sklaveco kaj la subpremo. . . erare supozante, ke tion postulas niaj interesoj, sed tio ankoraŭ ne pravas, ke la rusa popolo iras militi frivole, ĉar ĝiaj celoj estas multe pli noblaj, pli grandanimaj kaj pli neprofitemaj ol la niaj.

Ĝ. A. Makgahan (G. A. Macgahan)

El la bulgara: K. Vălev

¹ Ĝ. A. Makgahan (1844—1878) — usona ĵurnalisto, sendita en 1876 j. en Bulgarion de ĵ. „Daily News“ (Dejli Njuz) por enketi la staton de la bulgara popolo post la frakaso de la Aprila Ribelo. Makgahan donis abundajn informojn pri la turkaj kruelaĵoj. Tiuj informoj forte influis la demokratian publikon en Eŭropo helpe al la batalo de la bulgara popolo por libero kaj nacia sendependeco.



Amikeco trans limoj

SEMAJNO DE

INTERNACIA

AMIKECO

Sofio. La Semajno de Internacia Amikeco (SIA) estis solene malfermita per voĉa koncerto de la kantisto-baritono Veselin Damjanov — solisto de la Ŝtata Muzika Teatro „Stefan Makedonski“. Tiucele la 21-an de februaro ĉirkaŭ 300 esperantistoj kaj amikoj de Esperanto kolektiĝis en la granda salono de la Hebrea Kulturdomo.

Koncize pri SIA parolis Kunĉo Vălev — sekretario de BEA. Li ankaŭ prezentis la artiston. Pri la brila preskaŭ duhora koncerto de V. Damjanov ni donas apartan artikolon fare de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev — fakulo el la Konservatorio de Sofio. Sed ĉi tie ni ne povas ne substreki, ke tiu brila unika aranĝo transformiĝis en vere kulture feston por ĉiuj ĉeestantoj: ili ĝuis la altnivelan arton de nia elstara artisto-esperantisto, kaj la bonegajn lingvajn kaj muzikajn ecojn de Esperanto, la noblan etoson de internacia amikeco, pacamo la humaneco, kiu kreigis en ĉies animoj kaj koroj ĉu la koncerto.

Post ĉiu programero la entuziasmigita publiko esprimis sian admiron kaj kontenton per longedaŭraj tondraj aplaŭdoj kaj fine — per sinceraj dankvortoj, manpremoj kaj multe da florbuloj.

KV

Ruse. La solena kunveno dediĉe al SIA okazis la 25-an de februaro en la junulara domo de ŝiponstrua uzino „Ivan Dimitrov“. La salono estis speciale ornamita. Sur la muroj pendis kelkaj tabuloj kun bildartoj el la tuta mondo, ricevitaj de rusaj esperantistoj. Ĉe la enirejo pendis grandformate pentrita la emblemo de SIA — la du manoj en reciproka premo.

La solenaĵon malfermis Georgi Dobrev — prezidanto de E-societo „Libero“. Paroladon dediĉe al la Semajno faris bulgarlingve k-do Balĉev. Poste la prezidanto tralegis ricevitan ligo kun la Semajno leterojn kaj bildkartojn, kies amika kaj porpaca enhavo tre bone efikis al la ĉeestantaj neesperantistoj.

Originale verkitan versaĵon dediĉe al la Semajno tralegis Eoris Kavalĝiev. Sekvis belarta programo, muziko kaj ĉanĉoj.

B. Kavalĝiev

Kazanlâk. En solena kunveno pri SIA raportis Mariana Todorova el II-a politeknika gimnazio. Ŝi bone substrekis la meritojn de la loka esperantistaro por popularigo de nia lando kaj popolo eksterlande, por firmigo de paco kaj amikeco inter la popoloj.

K. Ĉindin

Renkontiĝo en Peŝtera. Je la 19—20 de februaro en u. Peŝtera okazis renkontiĝo de lernantoj-esperantistoj el kvar urboj — Pazarĝik, Plovdiv, Dospat kaj Peŝtera. La renkontiĝo estis dediĉita al la Semajno de Internacia Amikeco. Partoprenis pli ol 60 gelnantoj.

Unue la gastoj trarigardis la vidindaĵojn de la urbo. La vesperon ĉiuj kolektiĝis en la agrikultura teknikumo, kie ili ĝuis recitaĵojn, kolorfilmon el GDR en Esperanto, dancojn, amikan amuzadon. La junaj geesperantistoj el la teknikumo donacis florojn al siaj gastoj.

La sekvan tagon oni unue trarigardis la bone organizitan ekspozicion de esperantaĵoj. La prezidanto de la lernejana grupano de la loka E-societo „Nova Epoko“ Gaĉko Luĉev kaj liaj kunlaborantoj bone laboris por fari la ekspozicion interesa kaj alloga. Sur la muroj pendis 20 tabuloj kun pli ol 120 kolektitaj per Esperanto koleraĵ bildkartoj pri naciaj kostumoj.

En la okazinta aferkunveno parolis en Esperanto Ŝterjo Kukuŝev, E-instruisto en la agrikultura teknikumo, pri la temo „Organizado de korespondado inter E-instruistoj kaj E-klaso“. Sekvis viglaj debatoj.

Pri la agado de la Junulara Sekcio de BEA rakontis Ivan Vojnov.

Post la kunveno la gastoj kaj la komastroj direktiĝis ekskurse al la fama groto „Snejanka“ en la ĉirkaŭaĵo de Peŝtera. Ĉiuj estis ĉarmitaj de ĝia fabela beleco.

Ivan Vojnov

Varna. La urba kunveno, dediĉita al SIA, okazis en la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco. Pri SIA parolis k-do Kunĉo Vălev — sekretario de BEA. Li substrekis, ke la ideoj pri internacia amikeco kaj kunlaborado, pri paca kunekzistado de la popoloj kaj paca progresigo de la tutthomara kulturo estas bazaj ideoj de la akceptoj de Esperanto. Ĝuste tiuj ideoj inspiris Zamenhof fari sian ge-



nian kreaĵon, dediĉi al ili sian tutan vivon. Plue la ortatoro parolis pri la valora ĉiutaga praktika laboro de la esperantistoj por helpi la konstruadon de nova mondo — mondo sen ŝovinismo, naciismo, faŝismo kaj militoj, mondo de paco kaj internacia amikeco.

Je la fino de la kunveno estis projektita la filmo „La falo de Berlin“.

La sekvan tagon k-do Valev estis intervjuita de doĉ. Georgi Dimov — prezidento de DE de BEA en Varna. La intervjuo estis dissendita la 23-an de februaro pere de la urba radio-reto. Tiel ĝi estis aŭdita en multege da domoj, oficejoj, fabrikoj, lernejoj k. a., ĉar en la urbo ekzistas 70 000 radioriceviloj. Ĝi havis bonan efikon propagande al Esperanto.

Lili Andreeva

ĈU ESPERANTO TAŬGAS POR MUZIKA KREADO KAJ INTERPRETADO ?

Impresoj de koncerto de Veselin Damjanov

La 21-an de februaro ĉ. i. multnombra publiko kolektiĝis por aŭskulti la voĉan koncerton de la talenta bulgara kantisto-baritono Veselin Damjanov, solisto de la Ŝtata Muzika Teatro „Stefan Makedonski“.

La artisto interpretis ĉiujn pecojn de sia programo plene kaj ekskluzive en Esperanto. Lia bela, tembrorika voĉo, kolorata kaj variigata senĉese dank' al tre vasta skalo de nuanco kaj harmonio, sed precipe lia majstra traktado de la tekstoj kaptis la admiron de la publiko, kiu plene entuziasmiĝis kaj superŝutis la artiston per varmaj aplaŭdoj, krioj de aprobo, „bis“-oj kaj floroj. La kantiston akompanis per piano la konata rusa virtuozo Eŭgeno Komarov, kiu, krome, dum la intermedo ludis melodion de Rubinŝtein kaj siajn proprajn komponaĵojn.

La programo de la koncerto estis riĉa kaj varia. Damjanov havas tre buntan repertuaron. Baritono kun larĝa diapazono, lia voĉo facile adaptiĝas al ple diversaj stiloj, formoj kaj genroj, kaj li kun egala lerteco interpretas muzikaĵojn apartenantajn al tre malsamaj kategorioj: arioj, kanzonoj, romancoj, recitativoj, elegioj, folkloro, distra kaj amuza muziko. En la programo aŭdiĝis muzikpecoj de Modest Musorgskij („La Pulo“), de Jules Massenet („Elegio“), de Isaak Dunajevskij (Ario el la opereto „La maldiskreta vento“ kaj kanto el la filmo „La infanoj de kapitano Grant“) k. a. Grandan sukceson kaj viglajn aplaŭdojn rikoltis la ŝerca kanto „Nigra kato“ kaj unu rusa cigana romanco.

Estas notinde, ke dum tiu ĉi koncerto Veselin Damjanov distingiĝis ne nur kiel brila interpretisto, sed ankaŭ kiel talenta komponisto. Li plenumis seĝon da kantoj el sia propra muzikverkaro, komponitaj sur tekstoj de hungaraj, rusaj kaj bulgaraj Esperanto-poetoj (K. Kalocsay, R. Grinŝpan, Asen Grigorov, G. Miĥalkov k. a.). Ĉiuj liaj komponaĵoj estis tre favore akceptitaj de la publiko. Precipe grandan sukceson ĝuis la kanto „Mia kolekto“ laŭ versoj de Asen Grigorov.

V. Damjanov en la rolo de la ĉefa heroo Pablo en la opereto „La kiso de Ĉanita“ de Miljutin.

La entuziasmo de la ĉeestantoj fariĝis ĉiam pli granda, preskaŭ senlima, kiam ili mem rekte, sen admonoj kaj rezonado, konvinkiĝis pri la perfekta taŭĝero de Esperanto por muzikaĵo, pri la estetika valoro de la internacia lingvo; ili mem konstatis, kiom bele sonas Esperanto en la buŝo de bona kantisto, ili mem rekte ĝuis ĝian belsoncon. Damjanov sukcesis aŭdigi al ni parton de la granda muzika potencialo, kiu ĝermas en nia lingvo. Ĉar li posedas ne nur belegan voĉon kaj rimarkindan muzikan talenton, sed ankaŭ altan lingvan kulturon, absolute necesan por ĉiu kantisto. Li detale studis la Esperantan fonetikon kaj akiris tie klaran elvokivan elparolon. Kiam li kantas, la aŭskultanto perceptas senescepte ĉiujn vokalojn kaj ĉiujn konsonantojn, sendepende de la pozicio, en kiu ili troviĝas. Li penetrigis de la fundamenta principo, ke la voĉa muziko estas unualeke arto de la parolo laŭ la muzika intonado, la pitĉo, la tembro, la ritmo, la takto kaj la dinamiko de la melodio devas servi por la reliefigo de la paroloj. Tial tute mankas prozodia kaj fonologiaj eraroj aŭ eĉ malglataĵoj en liaj kanto: la muziko de la vortoj fidele sekvas la muzikon de la melodio.



En lingvistikaj kaj interlingvistikaj rondoj iuj ankoraŭ disputas pri la estetikaj funkcioj de Esperanto. Multaj lingvistoj jam akceptas ĝian utilecon por sciencaj, teknikaj kaj praktikaj celoj, sed iuj el ili kontestas ĝian taŭgecon por estetikaj funkcioj. Jam en la komenco de la jarcento Ferdinand de Saussure (Sos'ur) montris, ke la belsoneco ne estas immanenta propreco de la *lingvo* (konceptata kiel gramatika sistemo), sed ke tiu ĉi eco apartenas al la *parolo* (la konkreta, individua manifestiĝo de la lingvo) kaj dependas de la persono, kiu ĝin prononcas aŭ kantas. Do ĉiuj kontestoj koncernantaj la estetikajn valorojn de Esperanto estas nur vanaj aprioraj

rezonadoj, bazitaj aŭ sur antaŭjuĝoj, aŭ sur eraraj konceptoj. Se oni volas persvadiĝi pri la estetika valoro de la Internacia Lingvo, oni devas aŭdi voĉmuzikajn ĉefverkojn interpretatajn en tiu ĉi lingvo fare de altkvalitaj profesiaj artistoj, kiuj posedas ĝis tre alta grado de perfekteco ne nur sian „metion“ (arton), sed ankaŭ la fonemikon de Esperanto. Kiel modelon de tia interpretado ni senhezite povas montri la arton de Veselin Damjanov. Pri la vivanteco kaj belsoneco de nia lingvo nenio estas pli konvinka ol liaj koncertoj.

Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev
membro de la Akademio de Esperanto

Al la 70-jariĝo de BEA

LA UNUAJ PAŜOJ DE ESPERANTO EN BULGARIO

de Canko Murgin

Antaŭ ol mencii kaj aparte analizi la faktojn pri la penetro de Esperanto inter la bulgarojn, estus bone diri kelkajn vortojn pri la ĝeneralaj kaj specifaj cirkonstancoj en nia lando dum tiu tempo.

Bulgario estis malgranda neevoluinta lando, ĵus liberigita el sub la peza otomana kvinjarcenta jugo rezulte de la Rusa-Turka Milito (1877—1878). La nova lando sur la Balkana Duoninsulo grandparte likvidis la feŭdismon kaj rapide ekmarŝis sur la vojo de kapitalismo. En 1885 okazis la kunigo de Norda kaj Suda Bulgarioj en unu ŝtaton. En la sama jaro la lando travivis la serba-bulgaran militon. Interne de la lando okazadis akraj bataloj pri influo politika, ekonomia kaj kultura fare de la grandaj eŭropaj ŝtatoj. Komenciĝis formiĝo de bulgara laborista klaso. La laboristaro kaj la popola intelektularo komencis varme akcepti la ideojn de la socialismo kaj faris la unuajn provojn konstrui landajn sindikatan kaj partian organizojn sur la principoj de marksismo.

La lingva problemo

Pri la graveco de la lingva problemo sur la internacia tereno kelkaj bulgaroj

konsciigis jam dum nia Renesanco (1762—1877). En tiu rilato iuj laboris por enkonduko de komuna interslava lingvo. Unua meritas mencioni Nikolov-Siĉan, kiu en 1845 aperigis „Aritmetikon por bulgaroj“ en interslava lingvo. V. Ŝarkov disvastigis en 1885 „Programon“ de la eldonota de li scienc-filozofia, literatura kaj politika „Bulgara-Rusa Gazeto“, kies unua kaj lasta n-ro aperis en 1886. D-ro Ivan Bogorov formulis la lingvajn malfacilaĵojn por bulgaroj (1858), sed praktike kontribuis en 1887 per eldono de Interslava Vortaro, kies vortoj estas tradukitaj en francan lingvon, krome en iu sia gazeto li presigis tekstojn en interslava lingvo por montri al siaj legantoj la funkciadon de tiu lingvo. Poste Bogorov rezignis pri similaj streboj.

Por solvi la lingvan problemon sur la eksternacia tereno oni okupiĝis ankaŭ pri provoj transplanti kaj kulturi volapjukon (volapük).

Dank' al la aktivaj kulturaj rilatoj de nia lando kun Rusio la internacia lingvo Esperanto rapide penetris en Bulgarijon kaj trovis varmajn adeptojn en ĝi.

La unua bulgaro, kiu ellernis Esperanton, estas Miloslav Bogdanov.



La unua bulgara Esperanto-lernolibro

Miloslav Bogdanov lernis Esperanton laŭ la I-a eldono de la lernolibro de Zamenhof por rusoj (de julio 1887) kaj el ĝia teksto li kompilis kaj eldonis la unuan Esperanto-lernolibron por bulgaroj. La tekston de sia verko li komencis surpaperigi ekde la somero de 1888. La laboro daŭris tutan jaron — la manuskripto estis preta por presado en la somero de 1889. Serĉante presiston por ĝia aperigo Bogdanov konstatis, ke neniuj presejoj posedas la supersignitajn literojn de la Esperanta alfabeto. Fine li preparolis la eldonkondiĉojn kun la Ĉepalaca Presejo kaj sin devigis liveri al ĝi supersignitajn literotipojn el Vieno. Tuj poste Bogdanov iniciatis vastan pergazetan propagandon de Esperanto kontraŭ volapjuk.

Starigo de „Klubo Esperantista en Sofio“

Post la apero de la unua propaganda artikolo en gazeto „Svoboda“ (Libero), n-ro 299, 9. IX. 1889, M. St. Bogdanov ricevis dekon da pozitivaj respondoj el Sofio kaj aliaj lokoj. Tio ege kuraĝigis lin. La interesulojn li kunvenigis en la komenco de oktobro 1889. Ili decidis fondi Esperantistan Klubon. En la kronologio de la organizita esperantista movado en la tuta mondo tiu klubo estas unu el la plej fruaj. En junio 1888 L. Zamenhof atestas, ke en kelkaj lokoj de Rusio jam funkcias neoficiale E-rondetoj. En decembro 1888 konvertiĝas al Esperanto la volapjukista Mondlingva Klubo en Njurnbergo. En la printempo de 1889 fondiĝis esperantista klubo en Moskvo kaj la sekva estas la esperantista klubo en Sofio (okt. 1889).

En oktobro-novembro 1889 M. Bogdanov aperigis kaj represis tri varb-artikolojn sesfoje en tri ĵurnaloj („Makedonia“, „Struma“ kaj „Slavjanin“). Unu el ili estis titolita „Sciigoj de la Klubo Esperantista en Sofio“. Rezulte de tiu intensa propagando al la klubo

aliĝis ĉirkaŭ 125 personoj, precipe lernantoj.

„La Mondlingvisto“ — unua landa E-presorgano

Tiu gazeto estas la unua landa esperantista presorgano en la tuta mondo. Ĝin redaktis kaj eldonis Miloslav Bogdanov por la bezonoj de la naskiĝanta organizita E-movado en Bulgario. Aperis de ĝi entute tri numeroj (du en decembro 1889 kaj la lasta en januaro 1890). Ĝi estis redaktata paralele en bulgara lingvo kaj en Esperanto. La historiistoj kaj bibliofiloj ĝis nun trovis eĉ ne unu ekzempleron de iu ajn numero de tiu gazeto. Tamen dank' al aliaj informoj pri ĝi ĝia kompleta enhavo estas ĝuste konata.

La unua E-lernolibro por bulgaroj

Fakte la unua lernolibro de Esperanto por bulgaroj aperis sur la paĝoj de „La Mondlingvisto“. En aparta libro oni havis ĝin en februaro 1890. Ĝi estis rapide disvendita precipe inter la lernanta junularo. Tiu lernolibro estis la unua solida bazo por esperantistigo de la plej unuaj simpatiantoj al la ideo de lingvo internacia.

Jam en 1890 estis internacie konataj minimume tri bulgaraj esperantistoj: Miloslav Bogdanov, Ĥristo Popov el v. Dolna Orjahovica kaj Georgi Oreškov el u. Koprivštica, ĉar ili abonis la internacian organon „La Esperantisto“. El 113 abonantoj de tiu gazeto tri estis bulgaroj.

Vigla internacia korespondado

La legado de libroj kaj gazetoj, eksterlande eldonitaj, estas plejparte „pasiva“ ekzercado en Esperanto. La internacia korespondado prezentas abundajn okazojn pri „aktiva“ praktikado, utila dusence: por lingva perfektigo kaj por interŝanĝo de spertoj. Feliĉe, la kompletaj tekstoj de leteroj de M. Bogdanov al eksterlandanoj (kelkdekoj) kaj inverse estas konservitaj. En

oktobro 1890 Bogdanov ricevis la 17-an leteron de L. Zamenhof (vd. en „Bulgara Esperantisto“, n-ro 7-8, 1975, p. 32). El ties teksto ni rajte konkludas, ke Zamenhof konkrete interesiĝis pri ĉiu paŝo de la esperantista movado kaj ne ŝparis fortojn kaj tempon por ĝin helpi.

Samtempe Bogdanov estis ricevinta la 15-an leteron de la irlanddevena brita esperantisto R. H. Geoghegan kaj vigle korespondis ankaŭ kun dekoj da aliaj esperantistoj, precipe el Rusio. Ĥr. Popov kaj G. P. Oreškov ankaŭ starigis viglan perleteran kontakton kun eksterlando.

Klopodoj pri organiza stabiligo

Fine de la somero de 1890 Bogdanov faris novajn paŝojn por organiza stabiligo kaj enradikigo de la E-movado en Bulgario. En junio 1891 li aperigis la unuan kaj lastan numeron de gazeto „La Espero“. Samtempe li transformis la sofian klubon en landan esperantistan organizon, kies 10-paragrafa statuto aperis samjare en bulgara lingvo kaj Esperanto. La nomo de tiu unua landa organizaĵo en Bulgario estis: Internacia Societo „Espero“ en Sofio. La vorto „internacia“ en la titolo estas uzita en senco de „Esperanta“.

Dank' al longa vojaĝo, entreprenita de M. St. Bogdanov tra Suda Bulgario, kreigis personaj kontaktoj inter multaj bulgaraj esperantistoj. Rezulte de tiu varbkampanjo la bulgara Esperanto-Societo „Espero“ ekhavis novajn 21 membrojn en 10 urboj kaj 1 vilaĝo. En la periodo 1891—1892 tra la tuta lando aktivis 45 esperantistoj en 15 urboj kaj 4 vilaĝoj.

Gratulo al Esperantista Societo „Espero“ en Peterburgo

La kontaktoj de la Bulgara Esperanto-Societo „Espero“ kun la rusaj esperantistoj daŭris en spirito de interhelpo kaj reciproka kuraĝigo. Kaj kiam oni sukcesis ricevi oficialan per-

meson pri starigo de landa esperantista societo „Espero“ en Peterburgo (1892), al la fondkunveno venis nur unu gratulo el eksterlando — la telegramo sendita de Miloslav Bogdanov, prezidanto de la Bulgara Esperanto-societo „Espero“ en Sofio. Tia gratulo inter du landaj esperantistaj organizoj estas la unua en la historio de Esperanto.

Gazeto „Svjat“ — neoficiala organo de la bulgara E-movado

Unu el la neforgesendaj meritoj de la prezidanto de Bulgara Esperanto-societo „Espero“ estas tio, ke li varbis por nia movado la entrepreneman ĵurnaliston Nikola Kovaĉev, kiu sufiĉe longe ludis gravan rolon inkluzive dum la fondo de Bulgara Esperanto-Ligo en 1907. Oni povus lin kromnomi „bulgara Trompeter“, ĉar li disponigis al Esperanto la paĝojn de gazeto „Svjat“ ekde la komenco de 1893. Kovaĉev mem jam en tiu jaro aperigis pri-esperantajn artikolojn. Sed en la I-a jarkolekto precipe furiozis la propagando de M. Bogdanov. Tie li publicis serion da artikoloj, kiuj en la komenco de 1894 aperis en aparta broŝuro „Vsemirno meĉtanie...“ (Tutmonda Revo . . .), enskribita en la Zamenhofa listo de Esperanto-literaturo sub n-ro 69.

En 1894 al la poresperanta kampanjo de gazeto „Svjat“ aliĝis ĵurnalo „Glas Makedonski“ (Voĉo Makedona). Ĝi aperigis artikolojn de M. Angelov, kiu arde defendis la ideon, ke planlingvo povas sukcese funkcii kiel interkonatigilo de la popoloj. La aŭtoro alvokas al kunlaboro por solvo de la lingva problemo, dirante interalie: „Per tio ni montru al la mondo, ke ni ne estas apatiaj al la progresemaj movadoj de la popoloj“ (Glas Makedonski' n-ro 9, 23. I. 1894).

Atakoj de filologoj kontraŭ Esperanto

De januaro ĝis aŭgusto 1894 la scienc-literatura gazeto „Bălgarski Pregled“ (Bulgara Revuo) trifoje atakis Esperanton el „scienca“ vidpunkto. Oni

asertis, ke Esperanto estas nur unu inter la multaj internaciaj lingvoj, kiuj aperas ĉiujare po 5—6, sed ne povas enradikiĝi (jk. I, n-ro 5, januaro 1894). Post kvin monatoj la sama gazeto riproĉis: „Naivaj estas la pensoj de s-ro Kovaĉev pri la artefarita tutmonda lingvo. Por tiaj okupiĝoj estas necesaj pli da konoj. . . Gazeto „Svjet“ forte

propagandas la artefaritan lingvon“ (jk. I, n-ro 9, majo 1894).

La „sciencaj“ atakoj ĉesis provizore post la parolado de prof. Ivan Georgov, rektoro de la Sofia Universitato, okazinta fine de decembro 1905. En tiu parolado li esprimis tre favoran rilaton al Esperanto, rekonante ĝian utilecon. (Daŭrigota)

En 1976 j. niaj samnaciaĵoj JULIA kaj DONĈO PAPAŖOV efektivegis ekspedicion „Planktono“ IV en la Pacifiko. Ĉar tiu ĉi ekspedicio vekis grandan intereson en nia lando kaj en eksterlando, ĉi-sube ni publikigas pri ĝi artikolon, aperintan en revuo „Naša Rodina“ (Nia patrolando), n-ro 12/1976. Ni donas ĝin kun etaj mallongigoj.

Svetoslav Kolev

„DJU — V“ EN LA PACIFIKA OCEANO

La ekspedicio „Planktono IV“

Planktono devenas el la malnovgreka verbo „planao“ — „vagi, erarvagi“. Ĝi signas vegetojn kaj animalajn estaĵojn, kiuj vivas libere en la akvo, sed ne povas moviĝi solaj aŭ moviĝas ekstreme limigite. Ili estas portataj de supreniĝantaj kaj malsupreniĝantaj akvofluoj jen al la supraĵo, jen al la profundaĵoj. La planktono konsistas el algoj, sporoj, etaj meduzoj, kankretoj, larvoj ka. (kun dimensioj ekde kelkaj mikronoj ĝis kelkaj milimetroj), t. e. vegeta — „fitoplanktono“, kaj animala — „zooplanktono“, la unua servanta kiel nutraĵo por la dua. Per zooplanktono nutras sin multe da konioj, kankroj, fiŝoj kaj la balenoj.

La planktono estas konata al la homo ekde jarcentoj, ĉar li trovadis ĝin en la stomakoj de la kaptitaj fiŝoj kaj maraj mamuloj. Sed ĝi aparte altiris la atenton post la Dua Mondmilito, kiam oni ekparolis pri la „demografia eksplodo“ de la homaro, kiu ĉirkaŭ la 2000-a jaro atingos verŝajne sep miliardojn da homoj. La sciencistoj konstatis, ke la planktono, pli ĝuste la animala, riĉas je albumenoj kaj estas taŭga por la dombestoj kaj por la homo. La plej perspektiva montriĝis la zooplanktono kun la norvega nomo „krilo“, konsistanta el ruĝetaj krustuloj, similaj al la salikokoj. Oni kalkulis, ke nur en la akvoj de Antarktido estas de 500 milionoj ĝis unu miliardo da tunoj da krilo. De ĝi oni povus kolekti ĉiujare 40—50 milionojn da tunoj. Tiom estas ankaŭ la monda fiŝkaptado nuntempe. Rilate prilaboradon de krilo Sovetunio okupas unuan lokon en la mondo. La sovetaj specialistoj konstruis aŭtomatajn sistemojn kaj ellaboris teknologiojn, kiuj ebligas el krilo prepari nutraĵon por la homoj. En la magazenoj jam estas vendataj la briketoj „Oceano“ el planktono. Ili estas tre nutraj kaj posedas eĉ kurackvalitojn.

Geedzoj Papazov kaj la planktono

Geedzoj Papazov ne estas biologoj, nek maristoj, nek fiŝistoj. Donĉo Papazov finstudis ekonomi-sciencojn kaj laboras pri problemoj, ligitaj kun la maŝinkonstruado. Li naskiĝis la 21-an de februaro 1939 en Sofio. Julia Papazova, naskita la 7-an de julio 1915 en Sofio, finis konservatorion kaj estas muzikformantino en laborejo por popularsciencaj filmoj. Ili ne starigis antaŭ si la taskon esplori la planktonon el biologia aŭ ekspluatada starpunkto. Ilia celo estis pli simpla — kontroli, kia estos la influo de la planktono sur la homan organismon, se ĝi estas konsumata kiel kruĉaĵo. Ili nutris sin nur per zooplanktono, kiun ili kaptis per funelformaj retoj el muele aŭ kribritoj. Laŭ aspekto ĝi similas al verdanigra muko, kun malbonaodoro kaj malagrabla sal-amara gusto. Sed ĝi entenas vitaminon, albumenojn, grasojn. La kvanto, kiun





Julia ĉe sia ŝatata laboro

ili kaptis, estis relative malgranda kaj ne garantiis plenan nutraron de la homa organismo. Dum la 15 tagoj de la ekspedicio „Planktono I“ en 1970, efektivigita sole de Donĉo Papazov en la Nigra Maro, la zooplanktono estis lia nura nutraĵo. Dum la ekspedicio „Planktono II“ Donĉo kaj Julia trapasis Nigran Maron de Varna ĝis Odeso dum 26 tagoj kaj la planktono prezentis 50% de ilia nutraĵo. Proksimume la sama procento restis ankaŭ dum la ekspedicio „Planktono III“, kiam ili trapasis la Atlantikan Oceanon de Gibraltaro ĝis Santiago de Kubo (8160 km) dum 63 tagoj. Tiam Donĉo malpeziĝis per 17,5 kg kaj Julia — per 9 kg.

La ekspedicio „Planktono IV“

La unuajn tri ekspediciojn „Planktono“ geedzoj Papazov faris per malkovritaj boatoj: „DJU II“ (GU II) en 1970 estis malnova fiŝista boato de la tipo „seferka“; „DJU III“ en 1972 estis savvelboato kun longeco 7,40 m, larĝeco 2,40 m kaj alteco de la masto 7 m; „DJU IV“ en 1974 estis savboato laŭ SOLAS (La Internacia Konvencio pri Gardo de la Homa Vivo en la Maro) kun longeco 7,93 m, larĝeco 2,68 m kaj alteco de la masto 5,85 m. „DJU V“ estas ankaŭ boato de tipo SOLAS kun longeco 8,54 m, larĝeco 2,73 m kaj alteco de la masto 7,50 m. Ĝia korpo estas plasta kaj ne havas balasto-kilon, do ne estas provizita per speciala pezaĵo sub la fundo, kiu ekvilibrigu la kliniĝon dum forta ondiĝo. Kvankam la konvencio preskribas akvonepetreblajn sektorojn, por ke la boato ne dronu,

geedzoj Papazov forigas la aer-kamerojn por pligrandigi la utilan spacon kaj por ŝarĝi maksimuman pakaĵon. Ĉar la plasta korpo ne havas ripojn, la plaŭdo de la ondoj kaŭzas sonvibradon, kiu estigas forte incitantan bruon. Fine „DJU V“ en navigacia rilato estas netaŭga, ĉar ĝi ne kapablas funkcii bone ĉe malfavora vento. Havante antaŭvide, ke la ekspedicio daŭros 4—5 monatojn, en Varna la geedzoj muntas en la boato lignan ferdekon kaj aldonas kajuton por sinŝirmado ĉe malbona vetero.

La ekspedicio „Planktono IV“ starigas antaŭ si kvar taskojn, kiujn ĝi devas plenumi laŭ la veturplano ekde la haveno Kalĵao (Callao) en Peruo ĝis la haveno Suvo sur la insuloj Fiĝioj — distanco ĉirkaŭ 14 000 km.

La unua programo estas farita de la scienca kunlaboranto d-ro P. Penĉev kaj ĝi daŭrigas la esplorojn pri la kapablo de la homa organismo asimili la planktonon.

La dua programo estas preparita de la supera kunlaboranto d-ro K. Zlatarev — kandidato de la medicinaj sciencoj, kaj la scienca kunlaboranto d-ro G. Radkovski. Sub observado estas la reagoj de Julia kaj Donĉo en la kondiĉoj de reala danĝero kaj longedaŭra streĉeco, same kiel la reciproka tolerebleco en kondiĉoj de ekstrema ŝarĝo. La testoj estas similaj al tiuj per kosmenaŭtoj, kaj tiu ĉi programo estas parto de la komuna programo „Interkosmos“.

La tria programo estas preparita de la Interregistara Oceanografia Komisiono ĉe UNESKO kaj antaŭvidas esploradon de la polueliteco de la Pacifika Oceano per petrolaj kaj plastaj defalaĵoj.

La kvara programo antaŭvidas la preparon de kolora dokumenta filmo por la televido pri la vivo en la oceano kaj la vivo de la insulanoj.

Starto el Kalĵao (Callao)

La peruanoj estas rektaj posteuloj de la inkioj aŭ almenaŭ heredantoj de ilia antikva civilizo, kaj kiel konate, la inkioj krozadis tra la maroj sur malpezaj balsaj flosoj. Verŝajne ili koloniigis la pacifikajn insulojn. La sciigo pri la antaŭstaranta ekspedicio de la gebulgaroj incitas la peruanojn. La ĉiutagaj ĵurnaloj aperigas sur siaj unuaj paĝoj detalan artikolon. La radio kaj la televido intervjuas la geedzojn Papazov. La prezidento de la respubliko Francisko Morales Bermudes akceptas ilin je solena aŭdienco. El la haveno Kalĵao en 1947 ekveturis per sia flosa „Kon Tiki“ ankaŭ la fama Tur Hajerdal.

Julia kaj Donĉo Papazov ekveturas la 27-an de marto 1976 salutataj de multaj adiaŭantoj. La militŝipoj enblovas la sirenojn kaj flirtigas la festajn flagojn.



Solaj en la Pacifiko

Por atingi sian finan celon—Suvo, „DJU V“ devas sekvi senĉese direkton al okcidento. Teorie tio ĉi ŝajnas facila, ĉar la Perua Malvarma Fluo, konata ankaŭ sub la nomo Humboldt-Fluo, moviĝas okcidenten kun meza rapideco de unu kilometro hore. Tamen tiu ĉi fluo disiĝas je multnombrajn brakojn, ankaŭ la atmosferaj kondiĉoj en tiu ĉi jaro* estas tre nenormalaj. La navigado de geedzoj Papazov diference de la aliaj ekspedicioj, inkluzive tiun de „Kon Tiki“, transformiĝas en „vojaĝon de akcidentoj“.

Elirinte el Kaljao la boato trafas senven-tecon kaj ne povas atingi la Humboldt-Fluon. La 18-an de marto difektiĝas la rapidec-mezurilo. La saman tagon Julia, kiu plenumas ankaŭ la funkciojn de ferdeka radisto, estigas ligojn kun radioamatoroj el Peruo, Argentino, Puerto Riko, sed la 19-an de marto rompiĝas la anteno kaj la radioinstalaĵo eksilentas. Ĝis la Markizaj Insuloj — distanco de pli ol 7000 km — la du gebulgaroj estas tute izolitaj de la mondo. La 21-an de marto maraleono frapas per vosto la aluminian plumon de la direktilo. La boato perdas la direktelecon kaj du tagojn sin ĵetas senhelpa tien-reen. Fine Donĉo sukcesas forigi pli-malpli la difekton, kaj denove la boato ekaĝas en la ĝusta direkto. Tamen la nokton de la 31-a de marto, kiam Julia estas deĵoranta ĉe la direktilo, abrupta forta blovo de la vento turnas la malsupran transversan stangon de la masto, la tiel nomatan „gik“. La stango frapas Julia-n sur la kapon, kaj ŝi ekpendas senkonscia sur la parapeton. Feliĉe, ke ŝi estas ligita per ŝnuro, aliookaze ŝi estus falinta en la ondojn. La doloroj en la kapo ne ĉesas ĝis la fino de la ekspedicio.

En la noktode la 2 de aprilo la ventego rompas la maston. La supra parto kune kun la veloj falas en la akvon, la ŝnuroj implikiĝas, la boato kliniĝas, minacante ĉiun momenton turniĝi. Donĉo saltas en la akvon kaj sukcesas detranĉi la ŝnurojn. La sekvan tagon li kaj Julia apenaŭ sukcesas starigi la transversan mastostangon anstataŭ masto kaj etendi malgrandan velon. „DJU V“ rampas okcidenten. Viciĝas tagoj jen de senĉesa pluvo, jen de forta vento, jen de furioza ŝtormo.

La 10-an de majo geedzoj Papazov atingas Atuana-n, la ĉefurbon de insulo Hinaoa el la grupo de la Markizoj. Sur tiu ĉi insulo pasiĝis siajn lastajn tagojn Gogen (Gauguin). Julia kaj Donĉo kliniĝas antaŭ la tombo de la fama franca pentristo. Poste ili navigas pluen al insulo Fatuhiva, kie loĝis tutan jaron la juna Tur Hajerdal kaj kie ĉe li naskiĝis la ideo pri lia posta teorio pri la koloniigo de la pacifikaj insuloj fare de peruanoj.

De la Markizoj la geedzoj direktiĝas al la

arkipelago Tuamotu — timigilo por la maristoj pro siaj rifoĵoj. Ili traigas bonŝance inter la sennombraj subakvaj kaptiloj, sed du tagojn antaŭ ol atingi insulon Tahito ili renkontiĝas kun „maraamu“ — la sudorienta pasato, kiu furioze ĵetas sin sur la boaton. La 12-an de majo la navigantoj atingas la ŝirmitan havenon de Papeto (Papeete). Tuj d-ro Banis el la instituto „Malarde“ — unu el la famaj specialistoj pri la problemoj de la pacifika medicino, prenas ilin sub sian observadon kaj efektiviĝas ĉiun esplorojn, antaŭviditajn en la scienca programo de la ekspedicio „Planktono IV“. La tahitanoj, popolo el posteuloj de maristoj, estas en ekstazo pro la heroaĵo de la gebulgaroj. La gazetaro kaj la radio konkuras inter si ŝuti laŭdojn, la gubernatoro de Franca Polinezio aranĝas koktelon honore al ili, la usona kinoaktoro Marlon Brando, kiu edziĝis al polinezianino kaj loĝas en Tahito, aranĝas akcepton. Invitas ilin ankaŭ la sveda sciencisto d-ro Bengt Danielson — unu el la partoprenintoj en la ekspedicio „Kon Tiki“, nuntempe sveda konsulo en Papeto kaj direktoro de la loka etnografia muzeo.

Geedzoj Papazov muntas novan maston sur „DJU V“, riparas la rompitan direktilon kaj la 23-an de junio navigas pluen al la Subventaj Insuloj—norde de Tahito. Ili vizitas sinsekve la insulojn Huahine, Raiatea, Tahaa kaj Borabora. Huahine ravas ilin per la kantoj kaj la dancoj de la insulanoj, Raiatea — per la antikvaj sanktejoj, kie estis oferataj ĉe vivaj homoj, Tahaa — per la pureco de la raso kaj la beleco de la virinoj, kaj sur Borabora estas la tombo de Alen Ĵerbo (Gervase) — la soleca marnaviganto, kiu preskaŭ dudek jarojn krozis tra la oceanoj kaj kies navigadoj estas jam legendo.

Sed la Pacifiko plue kondukas negastame. La humido, la sendormo kaj la trolaciĝo pezas pli kaj pli forte. Sed malgraŭ ĉio „DJU V“ ĉiam sekvas sian direkton. Montriĝas insulo Upolu, sur kies norda bordo troviĝas Apio — la ĉefurbo de Okcidenta Samoo. Kaj denove senventeco. La fluo forportas la boaton al la korala rifo, ĉirkaŭanta la insulon. La katastrofo ŝajnas neevitebla. Julia kaj Donĉo kolektas en nilonajn sakojn la taglibrojn, la notojn pri la observoj, la provmaterialojn, la faritajn filmojn, metas sur sin la savĉemizojn kaj preparas sin por la momento, kiam „DJU V“ rompiĝos sur la rokoj kaj ili eble sukcesos atingi naĝe la bordon. Feliĉe, kiam ili estas nur je kelkaj dekoj da metroj proksime al la rifo, ekblovas facila vento el la monto kaj forpuŝas la boaton al la maro. Post kelkhora pacienca atendado geedzoj Papazov enŝovas sin en la havenon helpate de la vespera oceana vento.

En Apio la bulgaraj marnavigantoj denove estas ĉirkaŭitaj de honoro kaj atento. La lokaj ĵurnaloj laŭdas ilian heroaĵon, la prezidento de la respubliko, kiu havas la melodian

* 1976 jaro

samoan nomon „O le zo o le malo“ — „ĉefo de la registaro“ — akceptas ilin kaj amike kun ili interparolas. Apud Apio, kiu konsistas el 49 indiĝenaj vilaĝetoj, unuigitaj en komuna administra unuo, sur la kresto de monto Vaea troviĝas la tombo de la granda angla verkisto Robert Luis Stivânsân (Louis Stevenson). Gee'zoj Papazov honoras lian memoron. Post medicinaj kontrolesploroj ili direktas sin al la insuloj Fiĝioj. Iliaj konstantaj kunvojaĝantoj estas pluvoj kaj nebuloj. La arkipelago Fiĝioj konsistas el pli ol 800 insuloj el kiuj nur 106 loĝataj. La rifoj ne estas altaj kaj ne kaŭzas fortegan ondofrapadon kiel en la Tuamo'u-insularo, sed ĉe nebulo tio igas ilin ankoraŭ pli insidaj, ĉar la boato povas abrupte eksidi sur rokon. Je 20 mejloj de la haveno Suvo ili subite trafas vunditan balenon. Ĝi estas tiom proksime, ke per nura swingo povus frakasi la boaton, sed sin ĵetante tien kaj reen dudekon da fojoj ĝi subakviĝas kaj malaperas... La 3-a de aŭgusto „DJU V“ estas alligita al la kajo, kaj la ekspedicio „Planktono IV“ finiĝas.

Scienca valoro

Kiam en 1970 Donĉo Papazov entreprenas sian unuan ekspedicion, li notas en sia ferdeka taglibro:

„Alen (Alin) Bombar donis al mi la ideon, sed estis necese pasi kelkaj jaroj, por ke mi konvinku, ke mi estas preta por tia elprovo; mi finstudis kursojn por kapitanoj, kolektis monon por aĉeti boaton, tralegis ĉion skribitan pri la planktono...“

D-ro Alen Bombar tranavigas Mediteraneon kaj Atlantikan Oceanon per aerplenigebla kaŭcuka boato. En daŭro de 65 tagoj li nutras sin ekskluzive per freŝaj fiŝoj, kaptataj tute primitive, 23 tagojn — ĝis la unua pluvo — li kontentigas sian soifon per la suko elpremata el la fiŝoj. Por ekvilibrigi la mankon de vitamino C li manĝas planktonon, kiun li kolektas per malgranda reto. Bombar malpeziĝas per 25 kg, liaj hematioj malgrandiĝas de 5 milionoj al 2,5 milionoj, li ekhavas akutan anemion, la ungoj de la piedoj forfalas, sed la 23 de decembro 1952 li sukcesas atingi insulon Barbados. Dum Bombar uzas miksitan planktonon, Papazov atingas la konkludon, ke nutraj valoron por la homa organismo havas antaŭ ĉio la zooplanktono —

ĝi povas anstataŭi la fiŝojn, kiujn ne ĉiu kapablas kapti. Komence sola, poste kun Julia, Donĉo entreprenas 4 ekspediciojn. La sciencaj taskoj estas prilaboritaj anticipe per la helpo de kelkaj scienc esploraj institutoj. Pri la valoro de la atingitaĵo parolas la konkludo de la scienca kunlaboranto d-ro Petro Penĉev el la Instituto pri Nutrado ĉe la Bulgara Akademio de Sciencoj.

„La rezultoj de la fiziologiaj kaj biokemiaj esploroj montris, ke la taga uzo de ĉ. 150 g da freŝe kaptita planktono (precipe zooplanktono) dum la navigado antaŭforigis la atenditan ĉe tiuj ĉi kondiĉoj konsiderindan elĉerpigon de la organismo de ambaŭ partoprenintoj en la ekspedicio.“

Rilate al la psikofiziologiaj observoj la gebulgaroj havas pli grandan sukceson ol sia franca antaŭulo, kies problemaro estas multe pli modesta. La efektivigitaj memobservoj kaj la faritaj testoj donis bazon al la supera scienca kunlaboranto d-ro K. N. Zlatarev, kandidato de la medicinsciencoj kaj membro de la Pariza Akademio pri Kosmonaŭtiko, kaj al la scienca kunlaboranto d-ro G. I. Radkovski fari konkludon:

„La rezultoj de la variaj psiko-fiziologiaj kaj personaj esploroj de la efektivigintoj de „Planktono III“ daŭre estos valora fonto de sciencaj informoj, koncernantaj diversajn kampojn de la kono, inkluzive la kosmajn esplorojn.“

Kvankam la kolektitaj materialoj kaj observoj de la pacifika ekspedicio „Planktono IV“ ankoraŭ ne estas finstuditaj, oni devas atendi, ke la rezultoj konfirmos kaj plilarĝigos la donitaĵojn, akumulitajn de la antaŭaj tri ekspedicioj.

Fine meritas esti emfazita ankaŭ la nova punkto en la programo de la eksperimento pri la polucio de Pacifiko per petrolaj kaj plastaĵ defalaĵoj, pri kio ni ekscias estonte. La fido de la reprezentantoj de UNESKO, manifestita al niaj samnacioj, atestas pri la aŭtoritato, kiun ili ĝuas en la fremdlandaj sciencaj medioj.

El la bulgara: D. Haĝiev

INTERNACIA MEDICINISTA

E-KONFERENCO EN KRAKOVO

Universala Medicina E-Asocio kaj la Studenta E-Rondo ĉe la Medicina Akademio de Krakovo organizas Internacian Medicinistan E-Konferencon en Krakovo (Pollando) je la 13—17 de julio 1977.

La programo: medicinema prelego, vizito de farmacia fabriko, duon- kaj tuttagaj ekskursoj. La partoprenkotizo: ĉ. 1100 zlotoj (inkluzive la nokton, dufojan manĝadon en tago kaj la ekskursojn).

Aliĝdato: la 15-a de majo 1977.

Informojn kaj aliĝilojn: Vladimiro Opoka, str. Grzegórzecka 20, PL-31-531 Krakow, Pollando

*Na tutaĵoj de „Bulgara
Esperantisto“ nomas bone
ke ne monogas en enuiginta
supra u. egu ĉi tiu obŝtupig
ke emperanto*

*28.5.1977 m.
Lupus*

*Donĉo
dany*

Estimataj gesamideanoj!

Dum pli ol tri jaroj ni ricevas kaj legas en nia E-klubo en urbo Přerov vian asocian organon „Bulgara Esperantisto“. Dum tiuj tri jaroj ni trovis en ĝi multon instruan ankaŭ por nia agado, ne parolante pri la konatigado de niaj membroj kun via lando, kun viaj esperantistoj kaj ties agado.

Mi dezirus rakonti tute koncize pri nia E-agado. En ĝi eble troviĝos io utila ankaŭ por la legantoj de „BE“. Tiu ĉi agado konsistas el instruado de la lingvo, prelegoj, filmprezentoj, korespondado kun dekaj da ĝemiko el diversaj landoj, partopreno en lingvaj tendarlernejoj, seminarioj kaj renkontiĝoj de esperantistoj en diversaj lokoj enlande kaj eksterlande.

La membraro de nia klubo dum la lasta jaro duobligis. Nuntempe oni lernas la lingvon en tri kursoj — elementa, por progresantoj kaj konversacia. Pli spertaj membroj en la konversacia kurso aplikas sian konojn por tradukado en kaj el Esperanto, ĉu por propagandi la fabrikojn de Přerovaj Maŝin-fabrikoj, ĉu por la Distrikta Packonsilantaro ks. Komence de 1976 j. oni ekzemple esperantigis la Finan Akton de la konferenco en Helsinko, kiu traduko aperis en „Paco“. Sed ankaŭ en aliaj gazetoj aperis artikoloj verkita de přerovaj esperantistoj.

En sia korespondado kun eksterlandaj ĝemikoj la přerovaj esperantistoj ne nur perfekti-

gas siajn lingvo-onon, sed ankaŭ informas ilin pri la belaj de sia lando kaj pri la atingoj de la ĉeĥoslovaka popolo.

Tiu ĉi politike eduka kaj paca agado estas tre grava, ĝi kontribuas al komuna interkomuniĝo kaj paco.

Kore salutas vin via leganto

J. Tomišek

E-AGADO EN KAZAĤIO

La 20—21-an de novembro 1976 j. en la ŝtata konservatorio en Alma-Ata (Kazaĥia SSR) okazis E-renkontiĝo. Partoprenis ĝin gekursanoj el la fakultativaj E-grupoj de la konservatorio (gvidanto G. Gercikov), anoj de E-klubo „Verda Brigantino“ kaj „Aŭroro“ (gvidanto la sama), kelkaj esperantistoj el Alma-Ata (inter ili akademiano S. N. Boev kaj profesoro M. M. Kopilenko). Por la sukceso de la unua KER (Kazaĥia E-Renkontiĝo) bone kaj aktive kontribuis la gastoj B. Anohin (Ustj-Kamenogorsk), V. Jakovlev (Barnaul) kaj V. Andrejev (Ĉeljabinsk).

Post salutparoloj okazis demonstrado de lumbildoj pri E-arangoj en Sovetunio. Poste la mastroj invitis la partoprenantojn al orgena koncerto. Sekvis kantoj kaj recitado de poeziaĵoj en Esperanto.

Sekvatage okazis ekskurso al la mondfama glaciejo Medeo. Dum tiu ekskurso la novuloj estis bone paroligitaj de pli spertaj esperantistoj.

Ĝis malfrua vespero sur la sunaj stratoj de Alma-Ata sonis gaja E-parolado.

Gr. G.

INTERKONSENTO PRI KUNLABORO INTER ĈEA KAJ LA ASOCIO DE ĈEĤAJ FILATELISTOJ

Ĉe la komisiono de laŭtema filatelo de Ĉeĥaj Filatelitoj (AĈF) funkcias laŭtema sekcio „Esperanto“.

Por pliprofundigo kaj plifirmigo de reciproka kunlaboro ĉe propagando de filatelo, unuflanke, kaj de Esperanto, duaflanke, ĈEA kaj AĈF akceptis interkonsenton, kiu antaŭvidas reciprokajn sindevigojn.

La Asocio de Ĉeĥaj Filatelitoj plue plibonigas la laboron de la laŭtema sekcio „Esperanto“ kaj uzos ĉiujn siajn eblecojn por propagando de ĝia agado kaj por pligrandigo de ĝia membraro.

AĈF atentigos siajn membrojn pri la avantaĝoj de uzado de Esperanto por internaciaj filatelaj kontaktoj, subvencioj la necesajn elspezojn de la sekcio, certigos jare minimume 4-fojan aperigon de la „Informilo“ de la sekcio kaj ĝian dulingvan presadon,

t. e. en ĉeĥa aŭ slovaka lingvoj kaj en Esperanto, subtenos la kunlaboron de la sekcioj kun similaj sekcioj de eksterlandaj filatelaj asocioj, aparte en socialisma ŝtatoj, sendado la ekspoziciaĵojn de la sekcio-membroj al eksterlanda filatela ekspozicio ktp.

ĈEA uzos ĉiujn siajn eblecojn por propagandi la filatelon kaj interesigi siajn anojn pri membreco en AĈF, tio ebligos al ili membri en la laŭtema sekcio „Esperanto“. Al la sekcio estraro kaj membroj ĝi liveros senpage fakajn konsultojn kaj ankaŭ helpon por kompletigo kaj plibonigo de ties kolektoj dediĉitaj al Esperanto, kovros la elspezojn ligatajn kun la eldonado kaj dissendado de la dulingva sekcio „Informilo“ ĝis sumo 1000 kĉs, pagos la subskribitajn fakturojn por metalfolioj, stenciloj, paperoj, kovertoj, presado, poŝtpagoj ktp.

ĈIU DEVAS LABORI!

Saĝa homo estis onklo Filĉjo, saĝa kaj tre laborema. Li loĝis kun sia katino Maca. Dum li laboris en la ĝardeno, Maca senzorge dormetis. Tio tute ne plaĉis al onklo Filĉjo.

Apud lia domo kreskis fruktoriĉa prunarbo. Aŭtune la paseroj svarme atakis la bongustajn prunojn kaj tiel kaŭzis grandajn damaĝojn al onklo Filĉjo. Vane li persekutis ilin. Tiam li decidis utiligi la katinon: li fermis

ŝin en malgranda kaĝo kaj ĉiumatene elportis kaj kroĉis la kaĝon sur branĉo de la prunarbo. Kiam la paseroj surbranĉiĝis, Maca komencis malice miaŭi, kaj la flugilhavaj rabistoj tuj forflugis. Tiel la prunoj estis savitaj.

Ĉiuvespere, kiam onklo Filĉjo dekroĉis la kaĝon, li diris al sia katino: „Dankon, Maca! Hodiaŭ vi perlaboris vian panon. Ja kiu ne laboras, tiu ne rajtas manĝi!“

ETAJ NOVAĴOJ PRI ESPERANTO EN LA TURISMO

● Ofte eksterlandaj esperantistoj petas informojn pri eblecoj loĝi en Sofio kaj aliaj lokoj, precipe apudmaraj kaj montaraj, ĉe esperantistoj kontraŭ pago aŭ reciproka gastigado. Al interesuloj ni donas adresojn kaj aliajn sciigojn por senpera traktado kaj interkonsento. Skribu al Intergast, p. k. 45, 1000 Sofia.

● Aperis novaj glumarkoj por subteno de la kampanjo „Esperanto en Turismo“. Dezirantoj havigi al si kvanton por gluado sur siaj poŝtaĵoj, skribu al la sekretario de Monda Turismo.

● Lastatempe la komerca entrepreno „Peĉatni proizvedenija“ en Sofia, Varna, V. Târnovo, Velingrad k. a. bulgaraj urboj mendis en la ŝtata eldonejo „Septemvri“ ilustritan

poŝtkartojn kun surskriboj kaj klarigaj tekstoj en Esperanto.

En ĉiu urbo de nia lando povas esti eldonitaj poŝtkartaj vidindaĵoj kun E-tekstoj, se la estraro de la lokaj E-societoj petos pri tio la distriktan entreprenon „Peĉatni proizvedenija“.

● Ankaŭ ĉi-jare funkcios aviadil-buslinio „Esperanto“ inter Pollando kaj Bulgario, rekomendata de Monda Turismo. Pere de tiu ĉi linio multe kreskis la E-turismo inter ambaŭ landoj.

● La tradicia oficiala E-renkontiĝo en la kadro de la Internacia Specimena Foiro okazos kiel kutime je la 8—10-a de septembro: Distrikta Estraro de BEA, p. k. 184, 4000 Plovdiv, Bulgario.

En Plovdiv forpasis en sia 79-jara aĝo

Todor Rojdoŭ

Esperanton li lernis en 1918 j. kiel gimnaziano. Multjare li estis membro de la estraro de E-societo „Kulturo“, gvidanto de E-kursoj ka. Honorita per la ora insigno de BEA.

En februaro en Ŝumen forpasis la E-aktivuloj

Andrej Kamburov — 72-jara

Ĉanko Karaspasov — 67-jara.

A. Kamburov esperantistiĝis en 1923 — jam pli ol 50 jarojn li estas regula membro de E-Societo „Vekiĝo“, batalanto por paco kaj amikeco inter la popoloj.

Ĉ. Karaspasov multjare laboris aktive kiel prezidanto de „Vekiĝo“, lektoro de Esperanto kaj membro de CE de BEA.

En j. «*Rabotniĉesko Delo*» — Sofio (5. I. 1977) aperis artikolo „Alta pritakso de bulgara koruso“ — pri la brila prezento de la amatora kanthoro „Rodna Pesen“ el urbo Târgoviște en la 61-a UK de Esperanto en Ateno.

En la sama ĵurnalo (14. I.): informo pri la forveturo de Nikola Aleksiev, prezidanto de MEM, al Moskvo por partopreni la Mondon Pacforumon.

La saman daton la sofiaj ĵurnaloj «*Zemledelsko Zname*» kaj «*Narodna Mladeŝ*» informis ankaŭ pri la samo.

En j. «*Rabotniĉesko Delo*» (15. III.): detala informo pri la agado de gelernanta E-societo „Verda Raketo“ en u. Vraca.

En j. «*Dunavska Pravda*» — u. Ruse



III-A INTERNACIA ESPEPANTISTA FERIO-SEMINARIO

18—30 de septembro 1977, Velingrad

La pasintjaran E-ferion en Velingrad partoprenis 90 s-anoj el 7 eŭropaj landoj. Ĉiutage ili havis la plezuron bani sin en subĉiela aŭ subplafona mineralakva baseno, ĝui variajn vesperajn amuzojn, promeni meze de pitoreska naturo ktp. Aparte impresaj estis la ekskursoj: al la pereolokoj de la esperantistoj-kontraŭfaŝistoj el Velingrad Vela Peeva, Stoju Kalpazanov, Angel Ĉopev, la vitkampoj de v. Karabunar (100 000 dekarojn!), la baraĵlagoj de Batak kaj Belmeken (longa 12 km!), la subtera akvoelektra centralo «Kimon Georgiev», la montopintoj Belmeken, la fama montara ripozloko Jundola ka.

Se ankaŭ vi deziras plensate ĝui

pitoreskan montarnaturon, banadon en bonefikaj mineralakvoj, perpiedajn aŭ busajn ekskursojn, varian amuzan programon kaj veran kulturan ripozon, venu al Velingrad! Partoprenu en la III-a Internacia Esperantista Ferio!

Enkadre de la Ferio funkcias 10-leciona kurso por perfektigo kaj seminario pri la temo «Frato, amikeco kaj paco inter la popoloj».

Kotizo por 14 tagoj: 98 levoj. Eblas resti malpli da tempo, nepagante la tutan kotizon.

Estas akceptataj nur esperantistoj!

Pliajn informojn kaj aligilojn petu de: **Manol Colev, 4600 Velingrad, Bulgario.**

(22. I.): informo de Jordan Kalinov pri la ligoj de la esperantistoj el v. Borovo kun la esperantistoj el la samnoma urbo en Jugoslavio.

En la sama ĵurnalo (19. II.): ĝeneralaj informoj pri la agado de E-societo „Paco“ en u. Bjala.

En ĵ. „Gâlâbovska Iskra“ — u. Gâlâbovo (4. II.): informo de B. Kostov pri la jarkunveno de la loka E-societo. La kunvenon salutis la sekretario de la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio.

En ĵ. „Iskra“ — u. Kazanlâk (19. II.): informo de K. Ĉindin pri renkontigo de esperantistoj el Kazanlâk kaj Mâglij.

En ĵ. „Oteĉestven Glas“ — Plovdiv (20. II.): sub titolo „Esperanto — pasinto, nuntempo“ aperis bulgarlingve la intervjuo de la soveta sciencisto Magomet Isaev el la aŭtoritata soveta revuo „Sovetskij Sojuz“.

En ĵ. „Ĉumenska Zarja“ (5. III.): artikolo „Semaĵno de Internacia Amikeco“ de Cvjatko Todorov.

En ĵ. „Oteĉestven Front“ — Sofio (8. III.): artikolo „Esperanto en urbo Smoljan“ de Vasil Mitovski — pri la multbranĉa agado de la smoljanaj esperantistoj kaj aparte pri la nun konstruata kvinetaĝa Esperanto-lernejo „Pisnica“.

DEZIRAS KORESPONDI



Bulgario

Rosica Gârko — str. Klotnitsa 2, 3230 Kneŝa (instruistino — kun ĉi pri literaturo, muziko, b., pm, insigno — en Esperanto, rusa, itala, hispana).

Gelernanto 13—14-jara dez. korespondi tutmonde. Skribu al ilia instruistino R. Gârko

(la supra adreso; vidu la foton sur kovrilpaĝo 2).

Ivanka Markova — str. V. Kostov 65, apart. 24, Varna (44-jara konstruktistino — pri ĉi. filmoj, gram. diskoj, turismo).

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

INTERNACIAJ KURSOJ POR INSTRUISTOJ
KAJ KURSGVIDANTOJ DE ESPERANTO

*1—20 de aŭgusto, Burgas,
de Nigra Maro*

A. Por lernado de la lingvo:

I grado, II grado, III grado

**B. Kurso por instrurajto de
Esperanto**

En la kursoj estas akceptataj pre-
fere **instruistoj kaj kursgvidantoj**
(neprofesiaj E-instruistoj). La akcepto
en ĉiu grado estas farata surbaze de
dokumento pri ekzameno por la an-
taŭa grado.

Ĉiutage estas 4 lernohoroj, la cete-
ran tempon oni uzas laŭplaĉe (sur la
plaĝo, en promenadoj, ekskursoj ktp).

Limtempo de aliĝo: 31 de majo.

Kotizo por eksterlandanoj: 110 bul-
garaj levoj aŭ egalvaloro (por nut-
rado, loĝado, instruado, administrado).
Sumojn sendu al:

*Bulgario, 1303 Sofio, ĉrez Bâlgar-
ska Vânšnotârgovska Banka do DS
Kasa Blagoevski Rajon, smetka 185/
2553 na Sofijskija Okrâjen Esperant-
ski Komitet, bul. Hr. Botev 97.*

En la komunloĝejo oni ne rajtas
havi kun si infanojn aŭ nekursanojn.

Pli detalajn informojn petu de:
*Okrâjen Esperantski Komitet, bul.
Hristo Botev 97, 1303 Sofio.*

Venu perfektigi en Esperanto en
agrabla esperantista medio. Venu ĝui
la varman bulgaran sunon kaj la ĉar-
mon de la Nigra Maro!

БЪЛГАРСКИ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ

МЕЖДУНАРОДНИ КУРСОВЕ ЗА УЧИТЕЛИ
И КУРСОВИ РЪКОВОДИТЕЛИ ПО ЕСПЕ-
РАНТО

1—20 август, Бургас

A. За изучаване на езика:

I степен, II степен, III степен

**B. Курс за преподавателска право-
способност по есперанто**

В курсовете се приемаг с пред-
почитание **учители и курсови ръко-
водители** (непрофесионални препода-
ватели за есперанто). Приемането
става въз основа на документ за из-
държан изпит за предходната степен.

Всекидневно 4 учебни часа; оста-
налото време се използва по жела-
ние (на плажа, в разходки, екскурзии
и пр.).

Срок за записване: 31 май.

Такса за българи 70 лв. (храна,
квартира, обучение, административни
разходи). Суми изпращайте на адрес:
*ДСК Благоевски район, сметка 185/
2553 на Софийски окръжен есперант-
ски комитет, бул. Хр. Ботев 97, 1303
София.*

В общежитието не се допускат деца
и некурсисти.

Позече подробности от: *Софийски
окръжен есперантски комитет, бул.
Хр. Ботев 97, 1303 София.*

Елате да се усъвършенствувате по
езика в приятна международна еспе-
рантска среда!

Nikola Nikolov informas sia'n korespondan-
tojn kaj konatojn, ke lia nova, konstanta
hejma adreso estas: str. Ĉapaev 2, vhod V-9,
1113 Sofio.

Penko Georgiev Minčev — 4368 v. *Gorni
Domljan*, Plovdivsko (20-jara — muziko,
sporto, libro, turismo ka).

Rumjana Dobrev — str. Petrohan 1, 2240
Godeč (15-jara lernantino).

Nadja Stefanova Aleksandrova — str. T. Kab-
leškov 5, 2240 *Godeč* (15-jara lernantino).

Rumen Stojanov Todorov — str. Partizan-
ska 76, ap. 45, 6300 *Haskovo* (14-jara ler-
nanto).

Stan'a Angelova Jordanova — kv. Orfej 6,
vh. B, ar. 39, 6300 *Haskovo* (14-jara lernan-

tino).

Gergana Ruseva — str. Elbrus 14, 6300
Haskovo (14-jara lernantino).

Verka Stojanova Todorova — str. Baba Vida
25, 6300 *Haskovo* (14-jara lernantino — ko-
lektas b'k, pm).

Krasimir Andrianov Dimitrov — str. Parti-
zanska 78, vh. V-62, 6300 *Haskovo* (14-jara
lernanto — kolektas bk, pm).

Lozinka Borislavova Petrova — kv. Orfej 6,
vh. G — 75, 6300 *Haskovo* (14-jara lernan-
tino — kolektas b'k, pm).

Mari'a Grudeva Sakalova — kv. Orfej 9,
vh. A — 64, 6300 *Haskovo* (14-jara lernan-
tino — kolektas b'k, pm).